

BULTENO

GERMANA
ESPERANTA
FERVOJISTA
ASOCIIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung
deutscher Eisenbahner-Esperantisten



Fondita 1952

Numero 3

Majo/Junio/Julio 1966

FERVOJISTOJ EL 18 LANDOJ EN UTREÛT

La 18a IFEF-kongreso en Nederlando estis sukcesplena

Denove, post 15 jaroj, la nederlanda grandurbo Utreht gasteme akceptis de la 14a ĝis la 20a de majo 1966 340 esperantistajn fervojistojn el 18 landoj. La partoprenintoj, inter ili 78 gesamideanoj el Germanio, travivis allogan, bone preparitan programon. Por 1967 la 19a kongreso de la Internacia Fervojista Esperant-Federacio (IFEF) estas invitita al la germana urbo Fulda.

Elrigardante de mia hotelfenestro mi povis vidi la proksiman turon de la katedralo, bonfama ekkonilo de la grahturbo Utreht. Ĉiun kvaronan horon eksonis la ludado de la sonorilaro. Strat-orgeno liveris la muzikon por la matenmanĝo, kaj sur la vojoj miloj da nederlandanoj biciklis en nervostreĉa rapideco, sen akcidenti kun la multnombraj aŭtomobiloj kaj piedirantoj. Nekutima kompare kun la vetero dum antaŭaj kongresoj estis la varmego. Ĝi stimulis al ofta trinkado kaj ĝuado de glaciaĵo.

La kongreso komenciĝas

Relative rapide atingebla por la germanoj estis la kongreslando. En la stacidomo de Utreht bonvenigis salutvortoj el la laŭtparolio, afabla gesto, kiu bedaŭrinde ne estis kompletigata per anonctabuloj kaj flagoj. Post kelkaj paŝoj tra la frekventita urbocentro oni atingis la kongresejon, historriĉan domegon proksime al la katedralo. Nuntempe ĝi estas posedaĵo de la Transport-laborista Sindikato, kiu honore al siaj gastoj eldonis informan faldfolion en Esperanto. Kiel kutime renkontiĝis la unuan vesperon la kongresanoj por la interkonatiĝa vespero. Longjaraj geamikoj el diversaj landoj salutis sin, kaj estis tiu etoso, kiu ekzistas nur en Esperantujo pro la neekzisto de lingvaj bariloj. La gastigantoj estis eltrovintaj specialan amuzon. Ili aranĝis gurdo-

konkurson inter diverslandaj kolegoj, kiun gajnis la temperamentoplena s-ano Gimelli el Italio.

Dimanĉmatenon longa vico de omnibusoj atendis la kongresanojn por rondveturado tra la urbo. Ĝi donis okazon por konatiĝi kun mallarĝaj



La Esperanto-flago flirtas antaŭ la kongresejo

kanaletoj kaj multangulaj stratetoj en la urba kerno kaj kun vastaj avenuoj ekstere en novkonstruataj antaŭurboj, kies multetaĝaj domegoj el antaŭfabrikitaj elementoj forte kontrastas kontraŭ la nederlandaj konstruad- kaj loĝkutimoj.

Ekumena diservo

Unuafoje en la historio de IFEF-kongresoj okazis komuna diservo por katolikoj kaj protestantoj. Tiu kuraĝa aranĝo efektiviĝis nur post nefacilaj antaŭpreparoj. La liturgion transprenis pastoro Knoppers kaj la predikon pastro Wannemaker, kiu ankaŭ celebris la meson.

Inaŭgura programo nur en Esperanto

Agrabla novaĵo estis la okazigo de la inaŭgura solenaĵo dimanĉon vespere. Oni ne devis sopire atendi la kutime malfruan finon de la longa paroladvico. Ĉiuj parolantoj turnis sin en la Internacia Lingvo al la fervojistoj el 17 eŭropaj landoj. Plej eminenta gasto estis s-ro inĝ. S. A. Posthumus, ŝtatestretario el la Ministerio por Trafiko kaj Akvostato. Sincere li diris: „Hodiaŭ mi konstatas unuafoje persone la utilecon de via lingvo mem uzante ĝin. — Vi ŝparas multe da tempo — kaj mono.“ La prezidant-direktoro de la Nederlandaj Fervojoj (NS), s-ro inĝ. J. Lohmann, esprimis sian ĝojon, ke IFEF por kongresi elektis ĝuste Utreĥt kiel sidejon de NS kaj lokon por multaj fervojaj aktivecoj. Kiel tria el la eminentuloj la direktoro de la Ĝenerala Transportkaj Eksped-entrepreno Van Gent & Loos, d-ro J. Dorjee, informis la kongresanojn pri propraj spertoj rilate al diverslingveco: „La esperantistaj fervojistoj estas saĝaj homoj, ili uzas krom la ligoj de la reloj ankaŭ la pli firman ligilon Esperanto. Mi ne apartenas al tiuj saĝuloj, ĉar ĵus mi revenis de internacia konferenco en Londono, kies prezidanto mi estis kaj kie mi ŝvitis multege pro lingvaj malfacilaĵoj.“

La salutojn de siaj landaj asocioj transdonis la reprezentantoj de jenaj landoj: Aŭstrio, Belgio, Britio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Finnlando, Francio, Hispanio, Hungario, Italio, Jugoslavio, Nederlando, Norvegio, Svedio kaj Svislando. Por la Germana Federacia Fervojo (DB) transkomunikis bondezirajn salutojn la Supera Fervojkonsilisto Kirn, la Ĝeneralprezidento de DB. Kiel ĉefestrarano de la Sindikato por Germanaj Fervojistoj (GdED) parolis s-ro Schalmey elokvente, mem esperantisto. Fine la prezidanto de la Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA), s-ro Giessner, salutis la kongresanaron atentigante pri aktuala fervojhistoria evento okazonta fine de la kongresa semajno: en lojala kunlaborado inter Nederlando kaj Ger-

manio realiĝis la elektrizado de la grava fervojlinio Arnhem-Emmerich-Oberhausen, kaj ek de la 22a de majo 1966 elektre trakciataj trajnoj povas veturi ek de Amsterdamo ĝis Sicilio.

La intereso de la lokaj gazetoj estis konsiderinda. Oni raportis vaste kaj kun bildoj pri la kongresaranĝoj, i. a. pri la honora akcepto de la IFEF-estrazo kaj komitato per la urbestro en la urbodomo.



D-r De Ranitz, urbestro de Utreĥt, akceptis estraron kaj komitaton.

Junularo mankas

Kontraste al la ĝenerala Esperantomovado la junuara problemo en IFEF povas esti konsiderata ankoraŭ ne pozitiva. Junuloj ne estas multnombraj en faka movado. Tiuj, kiuj trovas fine la vojon al IFEF, atendas pli specifan programon. Ofte ili ne havas la monon resp. la devisojn aŭ preferas pure porjunulajn aranĝojn. Ŝajnas, ke ĉefe tiu kongreso evidentiĝis la mankon de la junularo. Oni nur povas esperi pri pli allogaj programeroj dum la venontaj IFEF-kongresoj. Tamen la IFEF-junularo povis konstati dum sia kunveno certan organizan progreson. Ankaŭ la agado de la novelektitaj dukromkomitatoj el la vicoj de la junularo fariĝos sendube fruktedona. Dum la internacia balo la junuloj donis kuraĝigan kaj vigligan akcenton laŭ instigaj ritmoj.

Aktivaj komisionoj

Ion ekster la ĝenerala atento restis la laboro de la fakprelega komisiono, kiu de pluraj jaroj sub la gvidado de s-ro Giessner zorgas modele pri la

livero de fake interesa kaj lingve korekta fakprelego dum la IFEF-kongresoj. Venontjare estas projektita kroma prelego, kiu okupiĝos pri skribaj ordoniloj por trajnoj kaj komparos la diverslandajn preskribojn.

Alia komisiono finis sian laboron prezentinte kiel aldonajon al la jam valida nova IFEF-statuto „Generalan kaj kongresan regularon“, kiu instigis en posta komitatkunsido ampleksan diskuton. Al s-ro Walder estu sincere dankata por lia plurjara lerta agado sur tiu agado.

La estro de la terminara komisiono s-ro Ritterspach, povis oferti fine la german-/esperantlingvan „Fervojan Terminareton“ kun 2000 fakterminoj plejparte tradukitaj el la leksikono de la „Unio Internacia de la Fervojoj (UIC)“. Ŝajnas ke la nerealigeblaj ideoj pri monstra fakvortaro definitive ĉesis. Kelkaj landaj asocioj deklaris sin pretaj eldoni similan fakvortareton surbaze de la ĵus eldonita. Pro tio ke la fakterminoj koincidas kun la opinio de la komisionanoj kaj demanditaj kompetentuloj, iuj ŝanĝoj ne okazos dum la venontaj jaroj. Tamen oni plutradukos fakterminojn laŭ la UIC-leksikono por krei centran kartotekon disponigotan al veraj interesuloj.

Laborkunsidoj kun abunda programo

Laŭ la IFEF-statuto la komitatkunsidoj estis nepublikaj. La gremio de estraranoj kaj komitatanoj multe suferis sub la varmego, sed ili okupiĝis kun fervoro kaj kuraĝo pri ĉiuj punktoj de la tagordo. Tamen ankaŭ por tiuj kunsidoj la tempo ne sufiĉis, necesis plilongigoj kaj antaŭkomencoj. Kelkaj landaj asocioj disdonis nur lastminute siajn jarraportojn. Iuj komitatanoj montris sin nesufiĉe informitaj pri punktoj de la tagordo aŭ artikoloj de la statuto. Oni demandas sin, pro kio la komitato jam dum la antaŭaj monatoj ne havas okazon skribe okupiĝi pri parte ofte banalaj aferoj. La manko de belga kaj pola komitatanoj pruvis la neceson de ambaŭflankaj klopodoj por ebligi la oficialan reprezentadon de ĉiuj aliĝintaj landaj asocioj.

Post vigla diskutado la komitatao akc ptis la novan „Generalan kaj kongresan regularon“. Kun bedaŭro devas esti notate, ke la sola rezultato el la referendumo pri la federacia organo „La Internacia Fervojoisto“ estas la publikigo de la diversaj opinioj. Do nenio ŝanĝiĝos, se neniu komitatano proponos ion konkretan. Post multaj vortoj estraro kaj komitato trovis la vojon, kiel la simpla problemo de budĝeto estu traktota, nome observi la statuton. Iom magra aspektis la laborplano de la estraro, sed la tempo por detale ekzameni la skizitajn punktojn mankis.

El la grandparte reprenitaj kongresproponoj provokis la plej akran diskuton la propono pri la aliĝo de IFEF al UEA kiel faka asocio. De 1962 IFEF jam „kunlaboras“. La plimulto de la komitatanoj decidis, ke tiu kunlaboro ne plu sufiĉas. La aliĝo ne alportos danĝerojn por la memstareco, sed pligrandigon de la reputacio kaj voĉrajton. Kun granda aplaŭdo estas reelektita la ĝisnuna estraro. La provizora redaktorino s-ino Burgler elektigis definitive.

En la publika laborkunsido, kie okazis la voĉdonado pri la antaŭdiskutitaj punktoj, oni akceptis ankaŭ la inviton de GEFA okazigi la venontjaran IFEF-kongreson en Fulda de la 6a ĝis la 12a de majo 1966. En 1967 IFEF kongresos en Bulgario.

Fakaj ekskursoj kaj prelegoj

La fakan karakteron de la kongreso substrekiĝis pluraj bonege preparitaj programeroj. Samtempe tri grupoj da interesuloj dise ekskursis, unu al vagonfabriko, unu tra la stacio Utreht C.S. kaj unu al la ĉefadministracio de la transportentrepreno Van Gent & Loos. La modela kunlaboro inter tiu ekspeda kaj ŝosetransporta firmo kaj la Nederlandaj Fervojoj estis la temo de la kongresa fakprelego „La mekanigo de la pecajmanipulado“. Multaj diapozitivaj katenis la okulojn, kaj ĉiuj plenatente sekvis la intersajn detalojn pri glate kaj rapide funkcianta pecfajrajt-servo realigata parte per kamionoj, parte per fervojaj vagonoj. Germanlingvan resumon vi trovis sur paĝo 6. La prezentado de fervojfakaj filmoj enkondukis tiun vesperon, kaj dum oni prezentis post la fakprelego plian filmon pri la skisemajno en Krimml (Aŭstrio), granda grupo da kongresanoj ekveturis per speciala aŭtobuso al transŝarĝejo de Van Gent & Loos por pliprofundigi tie la ĵus aŭditan scion. Plej interese el tiu vizito sendube estis la transportservo „pendanta konfekcio“ de tiu entrepreno: miloj da viraj kaj virinaj vestoj, sen iu ajn pakumo, pendantaj sur lignaj vestarkoj, estas transportataj en fermitaj kamionoj de la fabriko al granda transŝarĝejo apud Utreht kaj de tie al grandaj kaj mezgrandaj magazenoj ĉie en Nederlando. Tiu servo supozeble estas unuka tie.

Arta vespero kun eksterordinara ĥoro

La nederlandaj gastigantoj ne sekvis la tradician kutimon prezenti enlandan arton dum IFEF-kongreso. Ĉu tio nepre estis malavantaĝa, estas alia demando. Ŝajnis pli multe, ke la internacieco de IFEF-kongreso estis substreka taŭla per la prezentado de slavaj kantoj. Sub sia ukraindevena direktanto M. Antonoviĉ surprizis per siaj bone-

gaj voĉoj la Bicantina Ĥoro, kiu konsistas nur el nederlandanoj. La emociaj liturgiaj melodioj en malnovslava lingvo kaj la ukrainaj popolkantoj fariĝis neforgesebla travivaĵo. Ĉiuj kantistoj portis ukrainajn vestaĵojn, kio kompletigis la imagon de eksterordinareco.



Arta vespero — Kantas la Bicantina Ĥoro

Ekskursoj al kanaloj kaj digoj

Malgraŭ la citita fak- kaj laborprogramo restis abunda tempo por turismaj aranĝoj. Duontaga aŭtobusekskurso tra la „regiono inter la grandaj riveroj“ kondukis preter turniĝantaj ventmueloj kaj akvodigoj al la fama urbeto Gouda, kies gotika urbodomo vid-al-vide de renesanca pesejo ravis la rigdantojn. La mondfamajn vitralojn de la tiea preĝejo St. Johano elokvente eksplikis lerta gvidanto. Oni devis nur bedaŭri, ke la tempo pasis tro rapide.

Dua duontaga aŭtobusekskurso kondukis tra la barbariĉa regiono „Veluwe“ al Harderwijk, kie plenshopitaj stratoj forrabis valoran tempon, kaj fine al fiskaptista vilaĝo Elburg kun pitoreskaj dometoj kaj trotuaroj el nigraj kaj blankaj silikoj.

La lasta kongrestago estis laŭtradicie nura ekskurstago. Specialtraĵno veturigis nin de Utreĥt al Rotterdam, kie atendis nin la motorŝipo „Erasmus“. Tra kanaloj, riverbrakoj kaj aliaj akvovojoj kondukis la vojaĝo, subpasante lev-pontojn, turnpontojn kaj klappontojn, ĝis insulo artefarita enkadre de la giganta „Deltoplano“. Sur ĝi oni finkonstruas nuntempe 17 grandegajn kluzojn por reguligi la akvonivelon post definitiva fermo de kvar el ses markoloj, kiuj nun ankoraŭ distranĉas la sudan landparton. Post finrealigo de la Delto-Plano en 1978 la danĝeraj marbordoj de Nederlando estos 700 km malpli longaj ol nun!

Profunde impresitaj de tiu kuraĝa projekto kaj ĝenerale kontenta pri la 18a IFEF-kongreso oni aŭskultis sur la ŝipo la oficialan finparoladon. Sur la tabloj jam kuŝis la „Unua Informilo“ pri la 19a IFEF-kongreso en Fulda, kaj multkolora esperantigita urboprospekto kompletigis la antaŭan prezentadon de ravaj diapozitivaj pri la venontjara kongresurbo.

La granda familio de la esperantistaj fervojistoj adiaŭis dankoplene de siaj gastigantoj, kiuj multe klopodis, ke tiu 18a IFEF-kongreso estis sukcesplena.

kompil. de W. B.

10a GEFA-Jarkunveno

Ni kore invitas la membrojn kaj amikojn de nia asocio por la 10a jarkunveno en Uelzen la 15/16an de oktobro 1966

En la venonta eldono de nia BULTENO ni publikigos detalojn kaj programon. Aligiloj estas haveblaj ek de fino de aŭgusto per la distriktaj komisiitoj aŭ per la sekretario de la „Germana Esperanta Fervojista Asocio, 6 Frankfurt (Main) 9, Karlstr. 4—6“.

GEFA-estraro

Sprachprüfung

Anläßlich der 10. Jahresversammlung unserer Vereinigung in Uelzen (15./16. Oktober 1966) besteht wiederum Gelegenheit zur Ablegung der Sprachprüfung nach den Richtlinien des Deutschen Esperanto Institutes. Wir empfehlen unseren Mitgliedern und sonstigen Interessenten, sich schon jetzt auf diese Prüfung vorzubereiten.

Anmeldungen nimmt entgegen: BOAmt Dr. Lang, Prüfungsamt bei der Bundesbahndirektion Frankfurt, 6 Frankfurt (Main), Friedrich-Ebert-Anlage 35.

Nekrologo

En la aĝo de 84 jaroj mortis en Schriesheim la 24an de aprilo 1966 samideano Hund, unu el la plej fidelaj anoj de GEFA kaj IFEF. Kiel kolonia soldato li legis unuafoje en 1905 dum sia restado en Afriko pri la Internacia I ngvo, kies fervora adepto li restis ĝis sia morto. Multajn kongresojn, ĉefe tiujn de la fervojista movado, li vizitis. Nia asocio, kiu feliĉe posedas surbendigitan intervuon, profunde funebras.

18. IFEF-Kongreß in Utrecht

14. bis 20. Mai 1966

Auf Einladung des niederländischen Landesverbandes veranstaltete der „Internationale Verband der Eisenbahner-Esperantisten (IFEF)“ in Utrecht seinen 19. Jahreskongreß, an dem 340 Eisenbahner mit ihren Angehörigen aus 18 Ländern teilnahmen. Aus Deutschland waren 78 Freunde des Esperanto der Einladung gefolgt.

Im historischen Gewerkschaftshaus der niederländischen Transportarbeiter eröffnete der IFEF-Präsident De Jong (Amsterdam) im Beisein zahlreicher Ehrengäste, u. a. dem Generalvertreter der BD in den Niederlanden, den Kongreß. Die Grüße ihrer Landesverbände überbrachten die Vertreter folgender Länder: Belgien, Bulgarien, Dänemark, Deutschland (Herr Gießner), Finnland, Frankreich, Großbritannien, Italien, Jugoslawien, Niederlande, Norwegen, Österreich, Schweden, Schweiz, Spanien, Tschechoslowakei und Ungarn. Für alle Ansprachen, auch die der Ehrengäste, wurde bemerkenswerterweise nur Esperanto benutzt.

Der fachlichen Weiterbildung dienten eine Reihe von Besuchen bei betriebs- und maschinentechnischen Einrichtungen der Niederländischen Eisenbahnen, insbesondere aber ein durch eine Informationsfahrt unterstützter Fachvortrag, der einen aufschlußreichen Einblick in die Stückgutbeförderung innerhalb der Niederlande gewährte. Eine Zusammenfassung des Vortrags findet sich auf Seite 6.

Ĉu vi jam aĉetis la bazan verkon por nia
faka literaturo?

FERVOJA TERMINARETO

Kleines Eisenbahn Fachwörterbuch
Deutsch/Esperanto — Esperanto/Deutsch
de Gernot Ritterspach

formato: 11,4 × 16,2 cm
2000 fakterminoj sur 80 paĝoj

Eldonanto:

Germana Esperanta Fervojista Asocio

Mendu tuj fervojtelefone 955/2239 aŭ ĉe:
„S-ino Elisabeth Ritterspach, 607 Langen,
Berliner Allee 1“ — Poŝtĉekkonto
2765 31 Frankfurt (Main)

Prezo: 6,50 DM u. 10% por afranko kaj
pakumo. Laŭkvanta rabato ek de 10
ekzempleroj

Als besonderer Erfolg des deutschen Landesverbandes wurde gewertet, daß die schon länger geplante Herausgabe eines „Kleinen Eisenbahn-Fachwörterbuches“ mit etwa 2000 Fachausdrücken verwirklicht werden konnte. Einige Landesverbände stellten die Herausgabe von Parallelausgaben in Aussicht.

Organisatorische Fragen standen im Mittelpunkt mehrerer Arbeitssitzungen. Die „Komitatanoj“, die beschlußfassenden Vertreter der Landesverbände, bestätigten den bisherigen Vorstand für weitere zwei Jahre und nahmen die ergänzenden Bestimmungen zum Verbandsstatut an. Sie beschlossen nach einer temperamentvollen Diskussion auch eine engere Zusammenarbeit mit dem Welt-Esperanto-Bund.

Herzlichen Beifall fand die Einladung des deutschen Landesverbandes, den 19. IFEF-Kongreß vom 6. bis 12. Mai 1967 in Fulda abzuhalten. Für 1968 ist Bulgarien als Kongreßland in Aussicht genommen.

Außer einem gutbesuchten Ball veranstalteten die niederländischen Sprachfreunde einen Chorabend, dessen Reiz in der gelungenen Darbietung altslawischer, liturgischer und ukrainischer Gesänge bestand. Eine Besonderheit stellte der ökumenische Gottesdienst für beide Konfessionen dar.

Vorbildlich verliefen die Besichtigungs- und Ausflugsfahrten, die die Schönheiten der Grachtenstadt Utrecht und des Kongreßlandes erschlossen. Von sommerlichem Wetter begünstigt, besuchten die Kongreßteilnehmer die lieblich-romantische Stadt Gouda. Sie bewunderten den wie ein Freilichtmuseum wirkenden Fischerort Elburg und besahen bei einem ganztägigen Ausflug vom Schiff aus die großangelegten Deich- und Kanalanlagen im Deltagebiet. Auch der neugeschaffenen Insel Haringvliet galt ihr Interesse. Erstmals in der Geschichte der IFEF-Kongresse trugen die Sonderzugfahrkarten den Aufdruck in Esperanto.

Viel zu schnell verstrich die Kongreßwoche, während der die internationale Familie der Eisenbahner-Esperantisten ausgiebig die Gelegenheit ausnutzte, Esperanto für fachliche und private Zwecke zu praktizieren. Wohlthuend war die unaufdringliche Gastlichkeit des Nachbarlandes. Den niederländischen Kollegen und ihren Angehörigen sei aufrichtig für das gute Gelingen dieses 18. IFEF-Kongresses gedankt. W.B.

Die Mechanisierung des Stückgutverkehrs

von J. J. Labordus

Zusammenfassung des auf dem 18. IFEF-Kongreß
in Utrecht (Niederlande) gehaltenen Fachvortrages

In der Beförderung von Stückgut besteht in den Niederlanden eine feste Zusammenarbeit zwischen dem Schienen- und dem Straßenverkehr, d. h. zwischen den Niederländischen Eisenbahnen (NS) und der Firma Van Gend & Loos, dem größten Beförderungs- und Speditionsunternehmen in den Niederlanden. Der Stückgutverkehr der Niederländischen Eisenbahnen unterscheidet sich von dem anderer Länder durch seinen voll mechanisierten Ladedienst.

Das Unternehmen Van Gend & Loos wurde 1796 gegründet. Es setzte im Binnen- und Auslandsverkehr für die Beförderung von Personen und Stückgütern die bekannten gelbschwarzen Kutschen ein, die auf vielen Straßen zu sehen waren. Als im Jahre 1839 die erste Eisenbahnlinie in den Niederlanden ihren Betrieb aufnahm, endete im Personenverkehr bald die führende Rolle der Firma Van Gend & Loos, nachdem ein harter Konkurrenzkampf vorangegangen war.

Nach dem ersten Weltkrieg machte sich bei den Eisenbahnen der Kraftwagen als spürbare Konkurrenz im Stückgutverkehr bemerkbar. Die Beförderungsdauer bei der Eisenbahn war zu lange. Die Umlaufzeit der Güterwagen betrug etwa vier Tage. Dabei war auch die Zahl der Stückgutwagen verhältnismäßig hoch, nämlich 4000.

Im Jahre 1936 organisierten die Niederländischen Eisenbahnen diesen Verkehr neu und führten das sogen. Gruppensystem ein. Hierbei wurde das gesamte Gebiet Hollands in zunächst 40, später 27 Gruppen eingeteilt. Jede Gruppe hat einen Hauptgruppenbahnhof. Die Beförderung zwischen den Hauptgruppenbahnhöfen erfolgt abends und nachts mit Eisenbahngüterwagen. Vor der Umorganisation geschah dies am Tag. Mit Lastkraftwagen erfolgt die Beförderung von und zu den Hauptgruppenbahnhöfen sowie von und zu Orten, die nicht an das Eisenbahnnetz angeschlossen sind. Die Eisenbahnen gründeten außerdem ein Tochterunternehmen, die Allgemeine Transportgesellschaft, für solche Kunden, die die Beförderung ihrer Güter ausschließlich mit Kraftwagen wünschten. Bald darauf

ging dieses Tochterunternehmen in der Firma Van Gend & Loos auf.

Nach dem zweiten Weltkrieg übertrugen die Eisenbahnen der Firma Van Gend & Loos nicht nur den gesamten Beförderungsdienst des Stückgutes, sondern auch einen wesentlichen Teil der Verwaltung. Die Eisenbahnen besorgen nur die Beförderung auf der Schiene zwischen den Hauptgruppenbahnhöfen.

Mit dem Jahre 1947 begann die Anwendung des Palettensystems und der Gabelstapler. Diese Neuerung bedeutet eine schnellere Behandlung der Güter in den Umladehallen, außerdem ermöglicht sie die Palettierung des Haus-zu-Haus-Verkehrs. Das Umlade- und Wagenladungsgeschäft erfolgte immer stärker nach diesem System, so daß zahlreiche Geräte für die mechanisierte Behandlung beschafft werden mußten. Ein wesentlicher Gewinn ergab sich dadurch, daß die Güter nun innerhalb von 24 Stunden vom Versender zum Empfänger gelangen konnten.

Für die Beförderung von den Hauptgruppenbahnhöfen zu den größeren Orten innerhalb eines Gruppenbezirks werden Sattelschlepper eingesetzt, wodurch je Fahrt fünf Stunden für die Be- und Entladung eingespart werden. Entsprechend geringer ist auch der Bedarf an Güterwagen, er konnte durch die schnellere Umlaufzeit von 4000 auf 1300 Wagen gesenkt werden.

Bis zum Jahre 1957 setzte die Firma Van Gend & Loos für den örtlichen Zustelldienst auch Pferdefuhrwerke ein. Sie wurden jedoch durch Klein-Lastkraftwagen ersetzt, da der Verkehr dichter wurde, die Städte sich ausdehnten, Arbeitskräfte fehlten und andere Umstände für die Motorisierung sprachen.

Abschließend läßt sich feststellen, daß innerhalb der vergangenen 25 Jahre durch eine intensive Zusammenarbeit der Niederländischen Eisenbahnen mit der Firma Van Gend & Loos ein moderner und gut funktionierender Eisenbahn-Stückgutdienst aufgebaut wurde, der mit den übrigen Straßenverkehrsunternehmen durchaus konkurrieren kann.

Übers. v. W. B.

La plej granda privata stacio en Germanio

La foirejo de Hannover disponas pri la plej granda privata stacio en la Federacia Respubliko Germanio. Dum la foireja sezono (aprilo/majo) alvenis ĉiutage 12 eksprestrajnoj al kvin peronoj kun dek trakoj. Tiuj specialaj trajnoj transportis 33000 vizitintojn ĝis antaŭ la pordego de la foirejo.

La trakoj posedas direktan aliĝtubon kaj defluon. Tie estis lokigataj la direktaj litvagonoj el Svislando kvazaŭ kiel „hoteloj sur relvojo“, por esti je la dispono al la pasaĝeroj dum la daŭro de ilia restado. Same okazis kun unuopaj litvagonoj el Francio, Nederlando, Svedio kaj Danlando. Tiu aranĝo ofertis komfortecon kaj faris la vizitintojn sendependaj de mankaj hotelitoj.

W. B.

Klebmarken für den 19. IFEF-Kongreß in Fulda

Kennen Sie unsere Kongreß Klebmarken?
Noch nicht?

Dann sollten Sie sie noch heute bestellen!

Ein Bogen mit 25 zweifarbigen Klebmarken kostet nur 1,— DM.

Bestellungen als EDS nimmt entgegen: BHS Jentsch, MA Darmstadt.

Übrige Bestellungen nur an „19a IFEF-Kongreso, 6 Frankfurt (Main) 70, Postfach 7007 46“ richten. Gleichzeitig ist der entsprechende Betrag auf das Konto 40051 der Eisenbahn-Spar- und Darlehnskassen Frankfurt (Main) oder auf deren P.S. Konto Nr. 569 08 Frankfurt (Main) mit der Angabe „19a IFEF Kongreso“ zu überweisen. Für Versand als Drucksache sind 0,20 DM vorauszahlen.

La Pentekosta GEA-Kongreso

Sub la slogano „Por la internaciaj rilatoj la Internacia Lingvo Esperanto“ kunvenis en la miljara imperiestra-episkopa urbo Bamberg ĉ. 250 membroj de Germana Esperanto-Asocio (GEA) pro ties 44a kongreso. Ankaŭ pluraj gastoj el najbaraj landoj ĉeestis, kiam dimanĉon vespere la ĉefurbestro, d-ro Mathieu, en la solena imperiestra salono de la Nova Rezidejo antaŭ la filmaparatoj de la bavara televido bonvenigis la honorajn gastojn: reprezentantoj de la grandaj partioj, de la sindikatoj, kaj ankaŭ de la Germana Federacia Fervojo (BOR Hirschfelder de MA Bamberg komisiite de BD Nürnberg). Centra programero de la solenaĵo estis la festparolado de d-ro Werner Bormann, Hamburg, kies elokvente prezentitaj, nekontesteblaj argumentoj brile impresis ĉiujn aŭskultantojn.

La granda amplekso de la semajnfina programo malebligas ĉi-loke detalan raporton; ĉar la plimulto el niaj legantoj havas okazon legi ankaŭ la „Germanan Esperanto-Revuon“, ni permesas al ni esti resume koncizaj. — Dikan kongresdokumentujon oni ricevis en apudstadidoma akceptejo; multaj el la urbaj aŭtobusoj dum ĉiuj tri tagoj portis frunte sur tolaĵo la okulfrapan surskribon „Germana Esperanto-kongreso“; en sennombraj montrofenestroj de magazenoj pendis germanlingva invit-afiŝo al ekspozicio en la kongresejo „Freizeitwerk St. Heinrich“, al publika

parolado kun diskutado pri la temo „Was ist und wozu Esperanto?“, kaj al la supre menciita kongresa solenaĵo. La televido ne nur dum tiu vespero filmis, sed ankaŭ dum ambaŭ diservoj. — Speciala poŝtstampo kaj unuataga koverto estis haveblaj en la kongresejo, kie funkciis specialpoŝtejo.

Kunsidoj okazis, krom pri la kongresa slogano mem, sub diversaj temoj (E-o kaj lernejoj — reciproka helpo; kiel sintenas kritikantoj al nia informo laboro; spertoj el la subskrib-kolektado; Germana Antologio; E-o kaj universitato; kaj pri la estonta organiza formo de Germana Esperanto-Instituto). Dum la jarĉefkunveno de GEA, kiun senteble malhelpis la neĉesto de la malsana asocia prezidanto, d-ro Herrmann, salutis nome de GEFA Egon Kiefer (Stuttgart), kaj pli malfrue dum la tagorda punkto „raportoj de fakaj unuigoj“ Gernot Ritterspach informis telegramstile pri la aktivecoj de GEFA.

El la turismaj kaj distraj programeroj: „Leberkäsessen“, „Frühschoppen“, gvidita promenado tra la urbo, balo sur kastelo „Altenburg“, recitaĵoj de Alexander Starke, kolora sonfilmo de FIAT, lumbildoj kaj filmo pri Hamburg, la urbo de la 45a GEA-kongreso, kaj fine lumbildoj pri Tokio. Per tuttaga aŭtobus-ekskurso tra la Frankonia Svisujo finiĝis la valora kaj multflanka programo. Gratulon al la diligentaj organizintoj.

Ritt

Emerituloj en orientgermanaj stacioj

Fervojistoj atingintaj la aĝon de 65 jaroj ĝenerale ne plu devas labori. Oficiale ankaŭ la fervojistoj de la Germana Regna Fervojo (DR) en orienta Germanio forlasas la servon post la aĝo de 65 jaroj, sed lastatempe la fervojo denove interesiĝas pri tiuj rentuloj. La kaŭzo estas malpli la propra profitemo, sed la jam kronika manko de fervoja personaro. Pro la likvido de la oficista klaso ne plu estas pagataj pensioj laŭ okcidentgermana koncepto. Ĉiuj eksfervojistoj ricevas renton, kies altecon destinas la lasta posteno. Pro tio, ke pli aĝaj fervojistoj ofte ricevas malpli bone pagatajn postenojn, la rento sekve estas malgranda. Tiu financa mizero devigas kvaronon de la eksfervojistoj labori post ilia emeritiĝo.

Stariĝis specialaj laborbrigadoj, en kiuj helpe de distingitaj flagoj estas alstrebataj eble plej bona

laborefiko. La plej aĝa fervojisto havas 84 jarojn. Simptoma estas la dekoro de 70 jara meritoplena konduktorino kaj la servado de 72jara loko-motivgvidanto. Ke ankaŭ edzinoj de fervojistoj laboras en virinaj helpbrigadoj, estu menciata nur flanke.

Tamen la brigadoj de rentuloj kaj edzinoj ne alportis ĝis nun la deziritan sukceson. Oni iris novajn vojojn. La fervoja direkcio Erfurt instruis ĉiujn administrajn fervojistojn, kiuj taŭgas por la funkcia servo, en la manovrado. Dum dimanĉoj kaj festotagoj tiuj „skribtablo-manovristoj“ devas anstataŭi la ĉiutagan personaron. Ne mirinde ke la kvoto de akcidentoj estis po 200% pli alta ol normale.

(Laŭ „Der Bundesbahnbeamte“)

Esperanto auf Briefmarken

Eisenbahner-Esperantist und Philatelist Mager aus Frankfurt konnte seine Motivsammlung — 30 Blätter mit allen Esperantomarken seit 1925, den Klebmarken der IFEF-Kongresse seit 1958 und Sonderstempeln — seit 1962 wiederholt ausstellen.

Hier eine Übersicht der Ausstellungen:

1962

Mainz — BSW — 2000 Jahrfeier der Stadt Mainz
Wien — FISAIC — Betheiligungsmédaille verliehen

1963

Florenz — FISAIC — Außer Konkurrenz

1964

Mainz — FISAIC — Bronzemedaille verliehen

1965

Aachen — AQUISGRANA — Bronzemedaille verliehen

Hamburg — BSW — Leistungsschau Hamburg-Wandsbek — Bfm-Ausstellung — Bronzemedaille verliehen

1966

Kronberg (Ts) — Werbeschau des L.V. Hessen i. BDPH
Triest — Ausstellung der italienischen Eisenbahner-Philatelisten — Silberne Medaille der Stadt Triest verliehen
Stuttgart — BSW — Bronzemedaille mit Ehrenpreis verliehen

El la grupoj

Duisburg-Wedau. La Grupo danke ricevis donace de s-ro Bettges el Duisburg-Meiderich 23 librojn, inter ili la valora „Memorlibro pri Zamenhof“.

Stuttgart. Ek de junio 1966 la esperantistoj fervojistoj renkontiĝas sendepende de la urba grupo, kun kiu tamen ekzistas bona kunlaboro. La kunvenoj okazas ĉiun duan mardon je la 17,15 horo en la fervojista kantino de la ĉefstacidomo. Gastoj ĉiam estas bonvenaj.

La 26/27an de majo okazis en Aalen kunveno de la Fervoja Socialorganizo, kies delegitoj ricevis de la poresperanta komisito 150 ekzemplerojn de la germanlingva varfolio „Esperanto, la lingvo kiun vi sercas“.

Anoncoj

La 15a de aŭgusto 1966 estas la limdato por interesuloj pri feria semajno en Boldern apud Männedorf (Svislando) okazanta de la 4a ĝis la 10a de septembro 1966. Feriemuloj skribu tuj al s-ro Hans Hunkeler, poŝtako 417, CH-5001 Aarau, Svislando.

Vidu ankaŭ la anoncon en BULTENO n-ro 2/66!

Eldoniĝis nova prospekto pri ceramika maŝinaro, sanitara ceramikaĵo, ceramikaj produktoj kaj elektro-porcelano fabrikataj en Ĉeĥoslovakio. Mendu kontraŭ libervola rekompenco ĉe „ZK Esperanto, Prerovské strojiny, Převov, Ĉeĥoslovakio“.

Tiu eldono de la BULTENO ampleksas la monatojn majo/junio/julio, la venonta eldono la monatojn aŭgusto/septembro/oktobro. Ni petas vian komprenon.

La redakcio.

Herausgeber / eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main). Schriftleitung / redakcio: Wilhelm Barnickel, 6 Frankfurt (Main) 9, Karlstr. 4-6. Druck / preso: Limburger Vereinsdruckerei, 625 Limburg/Lahn. Der Bezug ist für Mitglieder der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten kostenlos. La abono estas senkosta por membroj de la Germana Esperanta Fervojista Asocio.